



LIBROJ EL ITALUJO

KORO. Edmondo de Amicis.

Libro por knaboj. 316 paĝoj Bind. 10ŝ. 6p.
Broŝ. 9ŝ. 0p.

RAKONTOJ POR GEKNABOJ. Italo Toscani.

Tradukis R. Castagnino. 88 paĝoj Broŝ. 2ŝ. 6p.

ŜAKLUDADO. Josefo Giascosa.

Esperantigis verse P. kaj R. Padulli.
Komedio en du scenoj. 48 paĝoj Broŝ. 1ŝ. aŭ
4 respondkuponoj

HISTORIO DE KRISTO. Giovanni Papini.

“Ni kore gratulas la eldoninton por la impona eksterajo de la libro, la nekonatan tradukinton por la granda laboro, konscienco kaj entuziasme farita, ankaŭ la verkiston por la verko mem.”

Literatura Mondo. 605 paĝoj Bind. 15ŝ. 0p.
Broŝ. 13ŝ. 6p.

Aldonu 10% pro la afranko.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.

Malsana blindulino, F-ino Penning, Sanatorio "Sonnevack", Paviljono 2, en Harderwijk, Nederlando, petas Esperantan korespondadon per brajla skribo.

Veldisto kaj motorriparisto deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata! Adreso: S-ro J. K. Kuiler, Emma-sstraat 40, Groningen, Nederlando.

Letervesperon okazigos la Breda-a Esperanto-Unuiĝo, "D-ro Zamenhof", en Aŭgusto. Respondo garantiata! J. Bosschaart, Herculesstraat 34, Breda, Nederlando.

Ĉu vi havas varojn vendeblajn? Skribu al Komercia Esperanto-Societo, Poŝtkesto 5888, São Paulo, Brazilo, kiu reprezentas ĉiaspacajn varojn. Ĉion akceptas por deviginti kaj interŝanĝi.

Iujn ajn nuntempajn **priceramik-industriajn** dokumentojn petas Profesoŝo Gerard, 104 rue Belleville, Paris 20, Francujo. Sendus laŭpete Parizanaĵojn.

Junaj gimnazianoj deziras korespondi kun junularo de ĉiuj landoj; certa respondo. Gimnazio de Z. Petkowska, LODZ, ul. Wolczanska 55, Esperanto-Kurso, Polujo.

Orientaj korespondantoj el Azio kaj Aŭstralio! Pri orientaj kulturoj, kutimoj, artoj, religioj, k.t.p., korespondadus Emil Jirku, fabrikestro, Hor. Srnie, p. Nemšová, Ĉeĥoslovakujo. Garantiataj respondoj!

Orkestro-gazbando interŝanĝas aŭ acetas modernajn kaj popolajn muzikojn (slows, swings, foxes, k.t.p.) kun eldona firmo aŭ muzikisto. Penicheiro Orquestra Jazz, Rua Almirante Reis 17, Barreiro, Portugalujo.

Artur Fonseca, Rue São Pedro do Areiro, Oeiras, Portugalujo, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj. Tuj respondos. Validas ĉiam.

44-jara finna Esperantisto deziras de ĉiulandaj gesamideanoj leterojn kaj bildkartojn. Certe respondos! S-ro U. A. Räsänen, Lappeenranta, Finnlando.

Brazia Esperantisto volas korespondi kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj. Interŝanĝas poŝtmarkojn. Nepre respondos! Oswaldo Leite de Moraes, Rua Libero Badaró 39-6 and., S. Paulo, Brazilo.

Korespondrondo tuthoma—formiĝas por studi, kundiskuti kooperajn komunumojn; por interŝanĝi tutplanedajn informojn, novaĵojn, ideojn pri ili kaj pri aliaj kooperaj aferoj. Adreso: Korespondrondo Koopera, per *Esperanto Internacia*.

Luis Duarte deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, speciale gejunuloj. Rua do Palácio de Coimbra 12, Barreiro, Portugalujo. Certe respondos.

Pra-historio; diskutado kaj interŝanĝado de ŝtonepokaj restaĵoj dezirataj. S-ro H. K. Hindmarsh, Kinangop, Kenya, Orienta Afriko.

Antikvaĵoj el Egiptaj tomboj, faraonaj, greko-romanaj, Moslimanaj. Moneroj, manuskriptoj, pentraĵoj. Lunzer, P.O.B. 196, Alexandria, Egiptujo.

10 gekursanoj diversagaĵaj deziras korespondi, interŝanĝi pm., k.t.p. Václav Krá PRAHA XIII-984, Smetanová 14, Ĉeĥoslovakujo.

Ĉiuj kompanioj kaj privataj komercistoj volantaj havi komercajn rilatojn kun Egiptujo pere de unu granda kompanio bonvole kontaktu: Nassif Isaac, Eastern Co., S. A. E., Giza, Egiptujo.

Anoj de la Sutton Esperanto-Klubo deziras alilandajn korespondantojn. Bonvole skribu al:—La Sekretario, Sutton Esperanto-Klubo, 3 Hillcroome Road, Sutton, Surrey, Anglujo. Respondo garantiata.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj 14 entuziasmuloj. Skribu al Frank Netrval, 16 Leamington Road, Blackburn, Anglujo.

Mi deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn. S-ro René Ventura Sales, Rua Baruel 63, Suzano, Est. Sao Paulo, Brazilo.

Du domhelfantinoj bezonataj por Anglujo. Sendu plenajn detalojn al D-ro Wilson, Wombourne, near Wolverhampton.

Teknikisto deziras korespondi pri matematiko, fiziko, tekniko, aŭ fervojoj. S-ro J. Boschaart, Herculesstraat 34, Breda, Nederlando.

Letervesperon aranĝos je 15 Septembro 1946 Centro "Stelo". Sendu leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn. Nepre respondos. D-ro J. Miguel Reyes, Tartagal (Salta), Argentino.

Antonio Barrot, Remedios E. de San Martín 4334, Buenos Aires, Argentino, pri teozofio, okultismo, k.t.p.

Tabelo de tagoj malbonaj kaj bonaj. Informo kontraŭ respondkupono. D-ro Havel Fr., ĉefdoktoro, Praha 55—P.O. Box 9, Ĉeĥoslovakujo.



Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 7

JULIO, 1946

UNU GRANDAN RONDON FAMILIAN...?

Diversaj epokoj alportis al la Esperantista popolo diversajn problemojn. Kelkafoje la problemoj naskiĝis el cirkonstancoj interne de la movado kaj la samideanoj povis kuniĝi, kaj per divido de la unuopaj spertoj, atingi solvon. Ne ĉiam ili sukcesis en tio, kaj eĉ nia mallonga historio sufiĉe elokvente atestas pri la gravaj perdoj kiuj povas rezulti el interna konflikto.

En la nuna momento nia movado frontas al unu el siaj plej gravaj problemoj kaj la scio, ke ĉiuj internaciaj movadoj havas la saman problemon, donas nenian konsolon, nek ŝetas lumon sur solvon.

Temas pri la rolo de Germanoj en la Esperanto-movado.

Facile estus ĉirkaŭparoli la aferon kaj ĝin prezenti per alteflugaj frazoj pri homaranismo kaj frateco, kaj per emfazo sur la ideala karaktero de Esperantismo diri, ke la pordoj estu larĝe malfermataj al la germana Esperantistaro. Sed tio per si ne havus rilaton kun la tuta realo kaj la tuta vero. Homoj finfine estas nur homoj, kaj ne estas facile forgesi . . .

Same facile oni povus reciti la longan liston da monstraĵoj kaj barbaraĵoj, da torturoj korpaj kaj mensaj, da kruelaĵoj nenomeblaj, kiuj okazis en la daŭro de la pasintaj dek jaroj, kaj el tiu listigo fari decidon, ke sur la tutan germanan Esperantistaron estu ŝtata ostracismo, kiu malebligis al ili ian ajn rilaton aŭ kunlaboron kun la movado Esperantista. Tamen ankaŭ tio ne havus rilaton kun la realo kaj la vero.

En tiuj du tute kaj absolute kontraŭstaraj vidpunktoj sidas nia problemo. Ne utilas eviti ĝin; ni devas ĝin fronti kaj formi nian politikon. Por la individuo tio ne estas problemo. Tiu faras sian decidon kaj la afero estas finita. Sed en granda organizaĵo kia la nia, ĉe kies anoj troviĝas ĉiaj vidpunktoj, ĉiaj religiaj kredoj kaj politikaj nuancoj, la solvo ne estas tiel facile atingebla.

La ofta aserto, ke I.E.L. estas neŭtrala, ne multe helpas. Necesas difini neŭtralecon, ĉar troviĝas du specoj de neŭtraleco; la neŭtraleco kiu difinas, ke oni havu nenian rilaton kun kia ajn tendenco, movado, kredo aŭ opinio; kaj la neŭtraleco en kiu povas sin manifesti ĉiuj tendencoj, opinioj kaj kredoj, kondiĉe nur ke regu absoluta egaleco kaj senpartieco, kaj ke manku perforto kaj trudemo kiu povas ofendi.

En la praktiko la unua speco montriĝas absurda, kaj tian movadon distingus nur vaneco kaj senpoveco. Tio estus senkerna ŝelo, rapidmortema kaj sen la volo vivi.

Sed la movado kies neŭtraleco estas karakterizata per toleremo kaj grand-animeco, kaj kies anoj scias ĝuste taksu kaj reciproke respekti la vidpunktojn unuj de la aliaj, tio estas organizajo jam preter la nigraj malindaj suspektoj, antaŭjuĝoj, kaj jaluzoj, kiuj dismordas kaj venenas la rilatojn inter la homoj.

Iu nia korespondanto diris, ke pri la neforgesegblaj krimoj faritaj, respondecas la tuta germana popolo. Teorie tio estas vera; kiel ankaŭ estas vere, ke pri mal-justaj faritaj kontraŭ Hindoj la tuta brita popolo estas respondeca; ke kulpas la tuta usona popolo pri ĉiu unuopa kruelaĵo farita aŭ farata kontraŭ negroj; ke la tute belga popolo kulpas pri tio, ke en Kongo unu indiĝeno suferis pro rasa malamo; ke longe antaŭ la Hitlera reĝimo la tuta pola popolo respondicis pri la kruelaĵoj kaj pogromoj* faritaj kontraŭ la Judoj; ke . . . sed ĉu necesas daŭrigi? La vero estas, ke la tuta homaro estas respondeca pri io, se ne pri unu afero certe pri alia, kaj anstataŭ lasi la emocion—ĉu naskiĝintan el ŝovinismo, ĉu el sufero—regi kaj sufoki la prudenton kaj liberigi sentojn de venĝo kaj malamo, oni agus pli saĝe kaj pli laŭ la digno de homo direktante la pensojn al konstruaj aferoj kun la celo certigi, ke tiaj malfeliĉoj neniam povu denove fali sur la homojn. Kulpigado estas luksaĵo, kiun oni preferu ne permesu al si, ĉar da ĝi ne estas fino.

En antaŭa numero de *E.I.* ni donis fidindan raporton pri kunveno en Germanujo en kiu sin trovis kun Germanoj ankaŭ *alinacianoj verŝajne el koncentrejoj*. Se tio povis okazi, se viktimoj mem de la naci-socialisma teroro povis fratumi kun germanaj Esperantistoj, kio restas direbla niaflanke? Kian rajton ni havas eldiri verdikton?

Dum Pasko la Estraro, reprezentanta tri naciojn,—du militintajn, unu neŭtralan—diskutis ĉi tiun problemon kaj prudente dekretis, ke I.E.L. en ĉi tiu afero konservu la saman neŭtralecon, kiun ĝi ĉiam montris antaŭ ĉiuj homoj, antaŭ ĉiuj movadoj kaj ĉiuj tendencoj. Starigi barilojn kontraŭ iu ajn homgrupo pro eksteraj kaŭzoj signifus rompon de tiu neŭtraleco. La Estraron ne motivigis sentimentaleco, sed la postuloj de la racio kaj de la prudento. Estas espereble, ke la Esperantistoj, kia ajn estu la privata opinio, ne volos trudi tiun opinion en la organizajojn, sed scios ankaŭ respekti la neŭtralan tradicion de la Esperanto-movado.

M.S.

DU NOVAJ VORTOJ EL BRAZILO

Laŭ la gramatiko de Esperanto, la vortoj fremdaj internacie uzataj apartenas al nia lingvo, nur kun la necesaj ortografiaj ŝanĝoj por ke ilin oni povu facile legi en Esperanto.

La nomoj de la monunuoj apartenas al tiu kategorio: penco, ŝilingo, funto sterlinga (tamen *pundo* estas nun multe preferata de Britoj: rim. de Red.), dolaro, franko, guldeno k.a. estas uzataj kiel fremdaj vortoj en Esperanto.

Danke al tiu regulo de nia gramatiko, la Brazila Registaro enkondukis du pliajn vortojn en nian vortaron per la Dekreto-Leĝo N-ro 4,791, de la 5a de Oktobro 1942. Ek de la 1-a de Novembro de 1942, la nova mono de Brazilo estas nomata *kruzejro* (en la nacia lingvo *cruzeiro*), kies mallongigo estas CR\$, ekzemple CR\$ 1000,00 (mil kruzejroj). Ĉiu kruzejro konsistas el cent *centavos* (centonoj). Sekve se oni vidos CR\$ 10,25, oni legu en Esperanto: *dek kruzejroj kaj dudek kvin centavoj*.

Eble oni diros nun: "centavo estas klara internacia vorto trovebla en *Plena Vortaro*, sed tiu stranga *kruzejro*, kie vi trovis ĝin?" Mi klarigos la aferon. Brazilo estas sub la Suda Stelaro, kies nomo en portugala lingvo estas *Cruzeiro do Sul*. La Portugalaj unue nomis ĝin *Terra da Vera Cruz* (*Lando de la Verka Kruco*), kaj tiun nomon oni ĝis nun kelkafoje uzas en poezio; sekve Brazilo estas nomata ankaŭ *Kruclando*, tial ni nomis nian monon ne mallogike *kruzejro*. Sed logike aŭ mallogike, bonvolu enskribi en vian vortaron tiujn du fremdajn vortojn, kaj sciu, ke 1 kruzejro valoras proksimume tri anglajn pencojn aŭ kvin usonajn cendojn.

I.G.B., Brazilo

MAJO 1940

En la katastrof' de l' kontinent'
Unu rifugejo al mi restas:
Nia hejmo, kie amosent'
Dolĉe kaj karese sunmajestas.

En krakromp' kaj tremo de la ter',
Dum arog' triumfas kaj mensogo,
Estas viaj ĉarmo kaj sincer'
Por mi solaj helpo kaj apogo.

En marego de diluvinizul'
Por mi, senespera mizerulo,
Restas am' en via korprofund'
Lasta kaj unika savinsulo.

Se dissaltu la planeda sfer',
Solvigante en senlima spaco,
Estus via kor', en steleter',
Por mi urno de eterna paco.

Lucien Laurat, Francujo

* pogromo—organizita atenco kontraŭ Judoj.

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

ARGENTINO

La tria Jarkunveno de Argentino Esperanto-Ligo okazis en Aprilo en Córdoba. Prezidis S-ro W. M. Goodes.

La ĉeestantoj stare honoris la memoron de Generalo Mangada Rosenörn ĵus mortinta en Meksiko, kaj S-ro Jorge Coupé mortinta en Buenos Aires.

La ĉeestantoj unuanime aprobis la decidon, ke A.E.L. aliĝu al I.E.L.

Oni decidis uzi la kurson de F. Szilagy por la koresponda kurso kaj ekklopodos adapti ĝin al hispanlingvo.

Estas decidite, ke la venonta Jarkunveno okazu dum Pasko 1947 en Buenos Aires.

BRITUJO

En dudeko da tendejoj por germanaj militkaptivoj oni nun lernas Esperanton, pri kiu montriĝas granda intereso.

La 7an-10an de Junio okazis en antikva urbo Bristol la 31a Brita Esperanto-Kongreso, la unua postmilita. Tre multaj samideanoj ne sukcesis sin enskribigi pro la manko de hoteloj kaj loĝejoj en tiu multe bombardita urbo; sed la 400 feliĉaj partoprenantoj povis ĝui la vere internacian karakteron de la kongreso sekve de ĉeesto de gesamideanoj el multaj landoj. Granda entuziasmo regis dum la salutparoloj de la alinacianoj, kaj precipe la ovacio al S-ro Andreo Cseh montris la ŝaton kaj estimon kiujn la britaj Esperantistoj sentas al li.

Inter multaj ĝuindaĵoj organizitaj de la Bristolanoj, elstaras *Sonĝo de Someromeza Nokto* de Shakespeare, duontaga aŭtomobilekskurso ĝis Cheddar kaj Wookey Hole kavernoj, kaj kompreneble, la Balo, malgraŭ ke en tiu lasta oni devis pro spaco iom kubutumi unuj la aliajn.

Okazis multaj fakkunsidoj kaj prelegoj, kiujn la ĉeestantoj amase partoprenis, kaj la Jarkunsido de la Brita Esperantista Asocio faris decidojn, gravajn por la estonteco de tiu organizaĵo.

Post fervora kantado de *La Espero* la kongreso finiĝis kaj la samideanoj disiris kun la adiaŭa saluto de la organizintoj resonanta en iliaj oreloj . . . Ĝis la Venontjara!

La 41a Skota Kongreso okazis dum la semajnfino de la 24a ĝis 27a de Majo en Leven, Fife. S-ro Fraser el Kirkcaldy prezidis kaj 83 delegitoj ĉeestis. Inter ili troviĝis du polaj Esperantistoj, kiuj salutis la kongresanaron. Sabate la urbestro kaj magistrato bonvenigis la kongresanojn ĉe oficiala akcepto. Dum la vespero horo de infanoj kantis Esperantajn kantojn.

ĈEĤOSLOVAKUJO

La 28an da Majo la estraro de la fakultato de specialaj sciencoj ĉe la ĉeĥa teknika altlernejo en Praha decidis, ke de la vintra semestro 1945-46 Esperanto estos prelegata du horojn en ĉiu semajno. D-ro A. Pitlik faros la lekcionojn. Tiamaniere reviviĝos la lektoreco, funkciinta tie de 1922 ĝis 1939.

A.P.

HUNGARUJO

S-ro B. Bleier raportas, ke pri la tutmonda alvoko por helpi al la hungaraj samideanoj en nia maja numero, li estas preta fari ĉiujn necesajn administrajn laborojn por apogi la helpemon de diverslandaj samideanoj. Li proponas, ke oni kontaktu lin ĉe Czákyliget, Hargitta-str. 10, kaj li eble povos doni solvon pri multaj malfacilaĵoj.

Alvoko: Petu de Budapeŝta Turisma Oficejo—Budapest V., Deák Ferenc-u. 2 kajeron pri ruinigita Budapeŝt. Tiu jam aperis angle, france, germane; petu en Esperanto.

NEDERLANDO

Okazis dum Pasko la 13a Kongreso de L.E.E.N. en Amsterdam. Partoprenis 210 gesamideanoj inkluzive de kelkaj eksterlandanoj. La Kongreson karakterizis bonhumoro kaj harmonio, kaj gravaj decidoj pri la estonteco estas faritaj.

POLUJO

La 14an de Aprilo la Varsovia Esperantistaro kunvenis apud la tombo de L. L. Zamenhof por soleni la 29an datrevenon de ties morto. La gazetoj volonte sciigis la publikon pri la solenaĵo kaj la tombejon plenis multaj Esperantistoj kaj simpatiantoj.

Ĉe la tombo, kovrita de floroj, unue parolis S-ro R. Sakowicz, ĉefdelegito de IEL en Polujo. S-ro Sakowicz aludis interalie pri la feliĉo kiun li havis pasigi kelkan tempon kun la Majstro post la unua tutruslanda Esperanto-Kongreso en Petersburgo.

Poste S-ro I. Dratwer, vicprezidanto de Varsovia Grupo, metis florojn sur la tombon kaj elokvente parolis pri la neceso labori por realigi la idealojn de L. L. Zamenhof. Rerezentantoj de la junularo—S-ro Kozłowski kaj gimnaziano Krysia Krawczykówna—ankaŭ parolis.

Post fotografado oni elserĉis lokon, kie antaŭe staris domo en kiu la Majstro iam loĝis, nun amaso da rubo. Sur la disfalintaj ŝtonoj kaj rubaĵo oni starigis

verdan standardon—ankaŭ tion oni fotografiis—simbolo de la espero triumfonta.

R.S.

Nota : La ĉi-supre aludita fotografaĵo de la tombo de Zamenhof estas havebla kontraŭ 2 anglaj ŝilingoj. Oni povas pagi al I.E.L. kiu aranĝos pri sendo de la fotografaĵo el Polujo.

PORTUGALUJO

Dum longa tempo—efektive de 1936—la Esperanto-movado ĉi tie perforte senvigliĝis, ĝis 1942, kiam kelkaj junuloj interesiĝis pri la internacilingva afero kaj, helpate de iuj malnovaj Esperantistoj, eklernis nian lingvon. Ili poste organizis Perleteran Esperanto-Kurson (P.E.K.) kaj per tio la movado denove funkciis.

La Zamenhofa Festo, 22an de Decembro 1945, estis la unua publika Esperanto-festo dum 10 jaroj en Portugalujo.

Elementa kurso komenciĝis en Barreiro en Februaro 1946, kaj en Aprilo oni festis la trian datrevenon de Esperanto-Rondo *La Vehiĝo* en tiu urbo. Partoprenis cent homoj.

Oni daŭre laboras por nia afero.

J. C. da S. Calado, Barreiro

SVISUJO

Al la vico de sukcesaj kongresoj aliĝis la 1946a, kiu estis invitita por la 26a de Majo ĝis 2a de Junio al la ĉarma urbo St. Gallen. Pro la dungado de S-ro Androo Cseh la aranĝo fariĝis plej interesa, la anaro kreskis de tago al tago kaj atingis 60 membrojn. Nia gasto ĉiutage gvidis daŭrigan kurson kaj vespere surprizis per interesaj prelegoj pri *Propagando, Universala Ligo, La Vivo en Nederlando dum la Okupado*. Ne mankis ĉiutagaj ekskursoj en la ĉarma antaŭalpa regiono.

Sabate aniĝis por ekzameno 7 kandidatoj, al ĉiu el kiuj D-ro Jaccard, prezidanto de la Ekzamena Komitato povis transdoni la diplomon. Pri *La horo de Hindujo* prelegis D-ro Edmund Privat, kaj plian fojon prezentis al ni siajn ideojn pri honesta politiko.

Sub prezido de S-ro J. Gilliard, Neuveville, okazis fine la ĝenerala kunveno de SES. Ĉiuj raportoj estis akceptitaj, la deficiito estis kovrita de bönkora samideanino, la prezidanto aplaŭde reelektita, kaj la Centra Komitato restas la sama kun S-ro Zollinger, F-ino Schaeer, S-ro Walder kaj S-ro Streun. Longan diskutadon kaŭzis la okazigo de la Universala Kongreso 1947 en Svislando. Malnovaj spertuloj vidas en la frua invito danĝerojn pro financaj malfacilaĵoj. La entreprenema parto de la kunveno kredas, ke dum la

jaro multo pliboniĝos kaj la brila kongreso povos altiri multajn gastojn. En harmonio kaj kuraĝeco la bela kongreso finiĝis.

O.W.

Agrikulturo

La Faka-sekcio de U.E.F. (Unuiĝo de Esperantistoj en Francujo) por Terkulturistoj kaj Agronomoj, kies estro estas S-ro Jouis, direktoro de la Agronomia Stacio de Seine Inférieure en Rouen, estas starigita kun jenaj celoj :

(a) grupigi kiel eble plej grandan nombron da Esp-istaj kamparanoj, vegetaruloj kaj interesitoj pri kamp-kulturo,

(b) kolekti nomojn kaj adresojn de eksterlandaj samfakaj samideanoj kaj teni ilin je dispono de la membroj, kiuj deziras korespondi aŭ vojaĝi eksterlanden,

(c) starigi kampkulturan terminaron.

Kamparanoj ne restu izolitaj, aliĝu al la faka Esperanto-movado. Por pluj informoj oni sin turnu al provizora Sekretario : Maurice Moindrot, Domery apud Rians, Cher, Francujo.

Aviado

Pli ol aliaj fakoj la aviado devus uzi Esperanton. Celante la starigon de Aeronautika Fako en la U.E.F. mi dezirus havigi en ĉiuj landoj kiel eble multe da korespondantoj interesitaj pri malpeza aviado, senmota aviado, aviadmodeloj.

Ni tiel provos fondi Korespondantaron de Esperanta Aeronautiko por interŝanĝado de ideoj, planoj, fotografaĵoj k.t.p. kun celo starigi fakan revuon. Skribu al S. Badez, 2 rue F. Fourcade, Le Plessis-Robinson, Seine, Francujo.

Geinstruistoj

La jena interkonsento estas farita inter la Groupe des Espèrantistes de l' Enseignement kaj la Society of British Esperantist Teachers :

"Ni subtenas la principon, ke la monda organizo de Esperantistaj edukistoj estu bazita je la kunagado de naciaj fakaj societoj.

Ni subtenas tujan kunlaboradon inter la franca kaj brita societoj, kaj konsentas, ke praktikaj servoj tuj uzeblaj estas necesaj.

Por efektiviĝi tian kunlaboradon, necesas regulaj informoj pri agado, do :

(a) La sekretarioj de la Societoj interŝanĝu bultenojn kaj aperigu novaĵojn unu pri la alia en la bultenoj. Pro tio estas necese, ke la bultenoj estu tute aŭ parte en Esperanto,

(b) ĉiu societo sendu la jarraporton al la alia, por ke ĉiu havu fidindan scion pri la alia.

(c) ĉiu societo informu la alian pri agado rilate edukajn, registarajn kaj internaciajn aŭtoritatojn laŭ okazo kaj invitu partoprenadon se eble kaj taŭge.

Por efektiviĝi interrilatojn inter geinstruistoj kaj gelernantoj ni havu alcelajn perantojn por korespondado kaj alispeca interŝanĝo (1) por geinstruistoj, (2) por lernejanaj; ni provu aranĝi reciproke vizitojn de geinstruistoj; ni celu reciproke la ĉeestadon de niaj membroj en niaj someraj lernejoj kaj aliaj konferencoj. Nur elektita partoprenanto rajtu paroli en la nomo de la societo.

Ni pritraktu antaŭ la fino de 1946 la ideon fondi kason el kiu ni povos subteni la koston de ebla internacia informilo kaj aliajn necesajn agojn sur internacia bazo.

Ni rajtigu niajn komitatojn pritrakti ĉiujn aferojn rilate nian kunagadon, akceptante aŭ la sekretarion aŭ alian difinitan anon, kiel la oficialan korespondanton, kiu raportu daŭre kaj regule al la tuta komitato kaj Societo."

Aparta noto de S.B.E.T. estas aldonita, ke dum la jara kunveno en Londono, la 5an de Januaro 1946, oni konsentis, ke kiam oni pritraktos la internacian instruistan asocion, oni pripensu metodon kiu ebligas al individuo senpere aliĝi al tiu asocio.

Grava paŝo en la kunlaborado jam funkcia inter G.E.E. kaj S.B.E.T. estas letero samtempe sendita de ambaŭ societoj al la respektivaj Ministroj por Edukado. La letero atentigas la Ministrojn pri la bona laboro jam farita de Esperanto inter lernejanaj kaj ties utilo, kiel bazo de mondordo. La Societoj ankaŭ petis la akcepton de malgranda nacia delegitaro.

Alia kontentiga okazaĵo estis la partopreno dum Pasko de F-ino M. Jay, Prezidantino de S.B.E.T. en la Jara Kunveno de G.E.E.

S.B.E.T. esperas bonvenigi reprezentanton de G.E.E. ĉe sia Somera Lernejo aranĝata 3-10 de Aŭgusto 1946 en Clitheroe, Lancashire, Anglujo.

V.C.N.

Katolika Movado

Tuj post la milito, kiam niaj gefratoj en Nederlando ankoraŭ ne estis liberigitaj, la Internacia Katolika Unuiĝo de Esperantistoj (IKUE) komencis sian laboron por restarigi la Katolikan Esperanto-movadon sur la tuta Eŭropa kontinento. La estraro sukcesis rapide reorganizi ĉiujn servojn. La monata revuo de IKUE *Espero Katolika* reperis je Kristnasko 1945.

Ni sendas alvokon al ĉiuj katolikaj Esperantistoj en la tuta mondo, precipe en

Ameriko, ke ili abonu amase. La abonprezo estas 3 Ned. guldonoj aŭ egalvaloro. Demandu senpagan provnumeron. Oni povas pagi pere de banko en preskaŭ ĉiuj landoj. Skribu rekte al: L.G.C. de Jong, Roelofarensveen, Nederlando.

Nome de la Estraro, V. Beckers, vicprez.

Skoltoj

La francaj skoltoj ageme preparas la estontan jamboreon, kiu okazos 70 kilometroj de Paris, la 9an de Aŭgusto, 1947. La programo jam entenas la daton de la unua kunsido de la skoltaj Esperantistoj en la tendejo. Tio okazos dum la dimanĉo 10an de Aŭgusto posttagmeze. Ni tre esperas, ke multaj estos la skoltoj, kiuj partoprenos tiun kunsidon, ke ankaŭ multaj estos la alilandaj delegitaroj, kiuj sin turnos al la administrantaro uzante Esperanton.

J.C.

S.O.S.—S-ro Lorcán OhUiginn, Dublin, Irlando, petas ke oni amase sendu leterojn al Radio Éireann, Dublin, petante programojn en Esperanto per la nuna stacio kaj ankaŭ per la nova stacio mallongonda. Oni petu dissendojn pri kurantaj irlandaj aferoj, sporto, historio, literaturo, lingvo, komerco, irlandaj herooj, k.t.p., sed ne petu dissendojn pri Esperanto aŭ Esperanto-kursojn. S-ro OhUiginn konsilas diri, ke la programoj dissenditaj en 1937-1940 vekis grandan eksterlandan intereson pri Irlando. Komprenible, ne menciui ke iu proponis ke vi tion faru!

LA PAPILIO

Envenis ĉambron eta papilio;
Eksteren flugi arde ĝi deziris,
Sed baris vojon nekonata io.
Antaŭen flugis ĝi, ekhaltis, miris.
"Ĉi tio estas kontraŭ ĉiu sperto.
Mi vidas lumon, brilan sunradion.
La vojon scias mi kun tuta certo,
Sed kontraŭflugas ĉiam, ĉiam ion!
Ĉu do hardiĝi povas la aero?
Ĉu pereanta estas nun la mondo?
Ĉu tute ne ekzistas plu ekstero?
La floroj ne, kaj ne la mara ondo?
Cent fojojn provis mi, sed sensukcese.
Mi sidas ĉe la nuna monda fino.
Ho! Malutilas flugi senprogrese,
Batali kontraŭ fera mondestino."
Ĝismorte laca ĝi trankvile sidis.
Nun mi malfermis, kaj la muta sceno
Finiĝis. Ĝi forflugis, rekonfidis,
Daŭrigis vivi—tute sen kompreno.

P. Th. Justesen, Danlando

LA PETSKRIBO

Pli kaj pli rapide kaj pli grandkvante alvenas la folioj, kaj oni povas konstati per la ĉi-subaj tabeloj, ke la ciferoj denove duobliĝis dum la monato. Laŭ korespondadoj ricevitaj, estas evidente, ke kelkloke oni ne rimarkis ke la tabeloj estas pretigitaj proksimume unu monaton antaŭ ol oni legas ilin—la presistoj en la nuna tempo ne tre rapide liveras la materialon. Notu do, ke la ciferoj en la tabeloj ĉi-kune estas faritaj nur ĝis la 7a de Junio, sed se eble ni aldonos lastmomente sumojn, kiel ni faris en la antaŭa numero.

De kelkaj landoj—ekzemple Nederlando, Svedujo k.a.—ni ĝis nun ricevis nur du-tri foliojn, aparte ensenditajn. Tamen ni scias, ke baldaŭ alvenos de ili grandaj kvantoj. Tute certe do la ciferoj rapide kreskos en la baldaŭa estonteco. Ne nur la nombro gravas, sed ankaŭ la kvalito, kaj estas interese konstati ke jam subskribis kelkaj tre gravaj kaj eminentaj personoj, inkluzive de membroj de registaroj.

Malofte ni Esperantistoj devas kroniki tro grandan sukceson, sed ŝajnas ke ni devos tion fari rilate al la nuna entrepreno. Kiam ni planis la Petskribon ni antaŭvidis ke ni povos subteni la kostojn el nia ordinara budĝeto. Tamen ni jam presigis kvinoble tiom da deklaroj kiom ni komence opiniis ke ni bezonos, kaj oni ankoraŭ presigas! La kostoj do estos multe pli altaj ol ni antaŭvidis. Feliĉe ne mankas bonvolemaj gesamideanoj, ĉiam pretaj helpi, kaj oni povas vidi sur alia paĝo ke jam kelkaj amikoj tre malavare subtenas ĉi tiun gravan laboron. Kompreneble, ni tre bonvenigos similan helpon de aliaj, ĉar jam evidentiĝas ke la nuna laboro havos tre gravajn sekvojn por la progreso de nia afero.

Jen la ciferoj ĝis 7a de Junio :

NASKIĜOJ

Martini—Je la 17a de Aprilo al D-ro kaj S-ino Alberto Martini, en Firenze, Italujo, du infanetoj, Maria-Luisa kaj Patrizia.

Melotte—Je la 9 Majo al Ge-sroj L. Melotte, 15 rue de la Briche, Saint-Denis (Seine), Francujo, filino, Simone.

Moindrot—Je la 4 Majo al Ge-sroj M. Moindrot, Domery, apud Rians (Cher), Francujo, filo, Jean Bernard.

Roose—Je la 10 Majo al Ge-sroj F. Roose, Brugge, Belujo, filino, Ingrid.

Landoj

Aŭstralio ..	946	Kanado ..	36
Aŭstrujo ..	44	Kenjo ..	5
Belujo ..	1357	Kongo ..	4
Brazilo ..	798	Luksemburgo	29
Britujo ..	6529	Maroko ..	922
Bulgarujo ..	13781	Nederlando ..	5
Ĉeĥoslovakujo	3	Norvegujo ..	7472
Danujo ..	1904	Nov-Zelando	449
Egiptujo ..	625	Palestino ..	6
Finnujo ..	4727	Polujo ..	5
Francujo ..	1949	Portoriko ..	1
Germanujo ..	85	Portugalujo	2713
Grekujo ..	342	Rodezio ..	6
Hindujo ..	46	Sieraleono ..	6
Hispanujo ..	1	Sud-Afriko ..	46
Hungarujo ..	1109	Svedujo ..	1
Irako ..	1	Usono ..	124
Islando ..	2495		
Italujo ..	7	sume ..	48579

Okupoj

Artistoj ..	307	Metiistoj	
Delegitoj		Diversaj ..	3575
Komonumaj	42	Navigaciistoj	302
Dentistoj ..	56	Parlamentanoj	17
Desegnistoj	262	Policistoj ..	243
Dommastrinoj	5685	Presistoj ..	496
Aŭtoritatuloj	64	P.T.T.-istoj	1144
Elektristoj ..	321	Religiistoj ..	162
Farmaciistoj	136	Sciencistoj ..	189
Farmistoj ..	2730	Sindikateoj	45
Hotelistoj ..	199	Soldatoj ..	702
Inĝenieroj ..	1714	Studentoj ..	4975
Instruistoj ..	2557	Ŝoforoj ..	398
Juristoj ..	226	Ŝtatoficistoj	922
Jurnalistoj ..	231	Teknistoj ..	101
Komercistoj	9056	Transportistoj	2821
Konstruistoj	601	Urboficistoj	243
Kuracistoj ..	626	Vendistoj ..	845
Laboristoj ..	3522	Vestistoj ..	646
Lingvistoj ..	52	sume ..	48579

Ĝis 26 Junio 61,250

MORTOJ

Gordon—Je la 18a Januaro mortis George Gordon, 88-jara, Christchurch, Nov-Zelando. Li tradukis multajn librojn, kaj fervore subtenis la movadon dum multaj jaroj.

Kuntze—Je la 28 Februaro 1945 forpasis Georg Oswald Kuntze, Dresden, Germanujo. Blindulo, li vizitis multajn kongresojn kaj estis bone konata.

Pizzi—Je la 20 Aprilo subite mortis nia Vic-Delegito en Firenze, Italujo, D-ro Francisko Pizzi, 66-jara. Esperantisto dum pli ol 25 jaroj li multe propagandis kaj verkis. Plej konata estas lia traduko de la *Floretoj de Sankta Francisko*.

RECENZOJ

= akireblaj ĉe I.E.L.



***Ŝakludado.** Josefo Giacosa. Tradukis el itala lingvo Fratoj J. kaj R. Padulli. 47 paĝoj (16.5 × 12 cm). Prezo 18. aŭ 4

respondkuponoj.

Ĉi tio ne estas lernolibro por ŝakludontoj, sed gaja amrakonto en versoj. La ritmo ne estas tre regula—plejparte neregulaj heksametroj—kaj iom, similas rekrutan soldaton, kiu ofte ŝanĝas la dekstrumadon de la paŝoj. Tamen tio ne estas malplaĉa, kaj ĝin kompensas la fakto ke la sintakso ne estas tro tordita, do—por versaĵo—facile komprenebla. Krome, la versoj estas en paroj rimaj.

Eble ŝakistoj ne konsentos pri la ŝak-terminoj: p. 36 *Alfero* (=kuriero); p. 46 *Makta ŝakumo!* (*ŝakmato*).

Gramatikaj kaj preseraroj estas neoftaj. Tamen, sur p. 44 la heroino nomas la *okulon flaman* de sia amanto *okulon fiaman*!!!

Kvankam la rakonto estas prezentita en porteatra formo—du scenoj, kvin aktoroj—miaopinie ĝi pli taŭgas kiel legaĵo.

T.P.

Tra Densa Mallumo: Esperanto-Eseoj pri movado kaj lingvo. Eldonita de Laborista Esperanto-Klubo, Kopenhago, 1942. 64 paĝoj (23.8 × 16 cm) prezo nemontrita.

Rigardante la eldonadon oni povas miri, ke tian ampleksan verkon oni povis eldoni en tiom maltrankvila tempo kaj sub sendube malfacilegaj cirkonstancoj. Sed dum mi admiras la kuragon kaj obstinon de niaj danaj samideanoj kaj gratulas ilin pro ĝenerale bona eldonaĵo, mi tamen devas esprimi la opinion, ke nur parte la verko sukcesas. Sekve de la limigo de cirkonstanco ĝi malsukcesas ĝuste en tiu fako, kie ĝi devus esti ĝusta, informa kaj aktuala, nome en la Dua Parto: *La Nuna Stato de la Esperanto-movado kaj ties Perspektivoj en la Estonto*. Por citi nur unu ekzemplon: la resumo kompreneble sin okupas precipe pri la laborista movado, sed en dek kvin paĝoj, trilinea aludeto pri IEL, kiu dum la tuta milita periodo estis la plej aktiva kaj plej multkontakta organizaĵo Esperantista en la mondo, estas per si indiko pri la neinformiteco de la kompilintoj.

La Tria parto, kiu donas birdokulan perspektivon super la evoluo de la lingvo kaj la diversaj skoloj, kiuj faris kontribuojn al ĝia disvolviĝo, estas tre valora kaj en la nuna tempo kiam tiom da verkoj estas

nehaveblaj, povas doni al la noveveninto tre netan kaj koncizan bildon pri la ĝeneralaj tendencoj en la Esperanto-lingvistiko. La stilo ĝenerale estas bona kaj facile komprenebla.

Mason Stutlard

Pac-Planoj "laŭ la Karto": de Edith Wynner. Havebla ĉe Campaign for World Government, Room 505, 343 S. Dearborn St., Chicago 4, Ill., Usono. 8 paĝoj, prezo 1 resp. kup.

Rekonante la propagandan celon de ĉi tiu broŝuro, kaj memorante ke la propagando tre ofte sin koncentras pri nur unu faceto de tiu diamanto—la Vero, oni povas tamen ŝati la koncizan analizon de la tri ĉefaj proponoj, kiuj celas certigi tutmondan pacon—Alianco, Konfederacio, Federacio.

Precipe atentinda kaj objektiva estas la ekzamenado de la dua, ĉar spite de la fina fiasko de la Ligo de Nacioj, la homoj—aŭ pli ĝuste ties regantoj—ŝajne ankoraŭ fidis je konfederacia formo de monda ordigo. Ne eblas uzi la terminon *mondregado*, ĉar la konfederacio estas nur ia kompromiso inter la sistemoj de grandpotenco kaj efektiva mondregado, kaj tial plenumas la funkcion nek de l' unu nek de la alia. La aŭtoro trafas montras, ke en la strukturo mem de la konfederacio alestas ĝuste tiuj tendencoj, kiuj pli malpli frue nenigas ĝian aŭtoritatan kaj potencon kaj kaŭzas ĝian disfalon.

Tio estas tre atentinda kaj aktuala resumo de la argumentoj por monda federacio.

M.S.

Klarigaj Vortoj pri la Pensologio de H. T. Hamblin. Eld. F. W. Hipsley, 17 Abbot's Rd., Birmingham 14, Anglujo. Ni ricevis N-ron 12 en la serio kaj konstatas la kutiman altan stilnivelon, kiu karakterizas ĉi tiujn broŝuretojn.

LA MORTINTOJ

Ili estis junaj, kaj de l' vivo
Vidis nur la malfermitan pardon;
Antaŭ tiu, malamikan hordon
Kaj la morton, por alternativo.
For de ĉiu loga perspektivo
Ili tuj sin turnis sen fanfaro
Kaj oferis ĉion al amaro
Laŭ antikva vir-prerogatio.
Kia nobla revo velkis tie?
Kia kanto dolĉa kaj spirita?
Jen, la menso dormas senkonscie;
Jen la harpo estas frakasita . . .
Kiom plu ni pagos pro eraroj?
Kio restas? . . . krom la vantaj jaroj?

Brendon Clark, Nov-Zelando

LA ESPERANTA GAZETARO

La artikolo *Ni Ordigu Nian Domon* de L. O'hUiginn en nia Aprila numero vekis iom da intereso, kvankam ne tiom kiom ni esperis. Ĉu el tio ni konkludu, ke niaj legantoj ne aprobas, aŭ estas indiferentaj? Tamen el la respondoj ricevitaj ni citas iujn vidpunktojn—ja ne estas eble presigi la leterojn entute.

F. J. W. Gresham (Anglujo) aprobante la artikolon, atentigas, ke ekzistas bezono por vere literaturo gazeto en Esperanto kaj diras, interalie, ke Esperantistoj sufiĉe flue babilas en Esperanto pri primovadaj temoj ĉar ili tion plej ofte legas, sed ne kapablas tiel prete diskuti nemovadajn temojn!

J. P. de Bruin (Nederlando) preferus, ke *E.I.* enhavu nur oficialajn informojn, kaj L. F. Hunter (Anglujo) vidas en Esperanto nur internacian helplingvon, sed nenion pli. J. C. J. Ham (Nederlando) skribis ". . . nia propagando ĉefe direktis sin nur al tiuj personoj, kiuj tute ne havis, nek bezonis, internaciajn rilatojn kaj tial ankaŭ ne bezonis internacian kontakton, eĉ per internacia lingvo. Kaj la personoj, kiuj ja bezonis lingvon por siaj internaciaj interesoj, baldaŭ forlasis la Esperanto-movadon ĉar ili ne spertis praktikan valoron pro la tro idealista sintenado de la fervoraj Esperantistoj. Se ni volas efektive propagandi, ni direktu nin al tiuj personoj, ne menciante Esperanton, sed nur la praktikan servon."

C. Stop-Bowitz (Norvegujo) skribis: "Laŭ mia opinio li estas parte prava, parte malprava. Absolute prava li estas en sia postulo, ke ni utiligu Esperanton pli multe por praktikaj celoj . . . sed li estas tute malprava en sia ideo pri divido de la Esperanta gazetaro kaj aperigado de plejble multaj gazetoj. Tre multaj Esperantistoj ne estas riĉuloj, malmultaj havas okazon aboni pli ol 1 aŭ 2 Esperantaj gazetojn. Ni vidis, ke aperis dum la jaroj tre multaj novaj gazetoj, sed ni ankaŭ vidis, ke multaj el ili malaperis post la apero de kelke da numeroj, plejofte pro nesufiĉa nombro da abonantoj. Laŭ mia opinio la plej saĝa sistemo de Esperanta gazetaro estas la jena:

1. Organoj de landaj asocioj, kiuj servas kiel kontaktiloj inter la membroj kaj kiel propagandiloj.

2. Organoj de sufiĉe fortaj fakaj asocioj, ekz. *Int. Medicina Revuo*, *Int. Pedagogia Revuo*, *Bulteno de Int. Scienca Asocio*, *Skolta Bulteno*, ktp.

3. Kelkaj tre malmultaj, grandaj internaciaj organoj ĝeneralaj, ekz. *La Praktiko*

por komencantoj, kaj *Heroldo de Esperanto* kiel la granda ĉefgazeto de Esperantujo. Se ĉiuj pli progresintaj Esperantistoj abonas *Heroldon* anstataŭ sin dividi je dekoj aŭ centoj da gazetetoj, ĝi fariĝus vere granda kaj povus enhavi diversajn fakojn: unu por la Esperanto-movado, unu praktikan, novajan, kaj eble ankaŭ unu literaturan. Tiel ni povus havi imponan gazeton, kiu farus impreson al eksteruloj, pli grandan ol faras 10 aŭ 100 gazetetoj.

Pri la novaĵa parto de tia gazeto, mi rimarkigu, ke ĝi kompreneble ne bezonos enteni ordinarajn novaĵojn, kiujn ĉiuj homoj ricevas en siaj nacilingvaj tag-jurnaloj, sed klerigajn, instruajn novaĵojn, per kiuj la tutmonda Esperantistaro lernos koni fremdajn landojn aŭ ricevos ĝustajn informojn pri aferoj, pri kiuj la nacilingvaj tagjurnaloj donas falsajn bildojn. Per ĉi tiu sistemo oni atingus, ke ĉiu Esperantisto bezonus aboni nur 2-3 gazetojn."

De M. Delcourt (Francujo) ni ricevis la sekvantan: "Mi ne kredas, ke la plimulto de niaj samideanoj konsentus plene kun la aŭtoro se ili povus voĉdonigi la aferon. Jam aŭdiĝis lastatempe plendoj pri la multigaĵo de niaj gazetoj kaj pri "gazetfonda febro", do opinio tute mala al tiu de nia irlanda amiko. Ĝuste en tio, ke ni havas tro da diletantaj "ĉefredaktistoj" kuŝas la malbono. Se ni volas serioziigi nian movadon, ni aspektu seriozaj kaj fanfaron, ne pri cent aŭ ducent gazetoj (!) sed pri kelke da solidaj revuoj aŭ jurnaloj, kaj ĉi tiujn ni havos nur kiam ni ne plu devos malŝpari nian monon abonante efemerajn foliojn kaj kiam niaj gazetoj, kun granda abonantaro, estos kompareblaj al niaj nacilingvaj eldonaĵoj. Krome, ni jam ne toleru la fuŝajn skribaĵojn de fruverkemuloj, ni kuraĝu bojkoti la gazetojn kutimantajn elverŝi positele la stilaĵn kaj gramatikajn erarojn. Tiajn gazetojn en nacia lingvo ni ja ne aĉetus, kaj eĉ ili ne aperus!

Mi konsentas, ke *E.I.* fariĝu nia plej grava organo, sed ĝi ne estu nur oficiala. Ne pli ol duona parto estu pri-Esperanta, tamen ĉi tiu parto entenu ĉion sciindan pri nia movado kaj liveru konsilojn pri komuna agado laŭ tute renovigita plano. Konsiderante la situacion de la neriĉaj samideanoj, oni klopodu, ke tiuj kiuj abonas almenaŭ la organon de IEL, ricevu interesan legaĵon, t.e. ke en ĉi tiu gazeto ili trovu iom da ĉio: informon, literaturon, sciencajn artikolojn, ktp. Tiu alia parto estu neniam pedanta kaj ne transpaŝu la asignitan kadron de vulgariĝo.

Verŝajne *Heroldo* baldaŭ reaperos, kaj dezirinde ĉiusemajne. La eldonisto jam provis dum kelok da jaroj sian kapablon ĉefredakti bonegan ĵurnalon; li klopodu nun, ke *Heroldo* iĝu la vivanta parolilo de niaj samideanoj, iniciatante raportojn kaj enketojn pri la ekonomia kaj politika situacioj en ĉiuj landoj. Nia granda novaĵgazeto fariĝu vere la heroldo de la nova tutmonda kulturo."

Ni opinias, ke komentario ne necesas, krom por esprimi nian dankon al la korespondantoj kaj aparte gratuli la du laste nomitajn por iliaj vere praktikaj kaj faktaj vidpunktoj. Cetere, *Heroldo* jam aperis kaj la unua numero tute pravigas la esperojn kaj fidon esprimitajn ĉi-supre. Ni salutas la reaperon de nia dorminta koleorgano, kiu vere venis el sia letargio kiel refreŝigita fortilo, kaj ni gratulas la eldoniston pro efektive bona kaj inda gazeto. Lia devizo *Nun aŭ Neniam* estas en akordo kun la spirito de la tempo kaj tiu alvoko certe trovos eĥon en ĉies koro.

La Legantoj Parolas

A. de Freitas (Rio de Janeiro) skribas:

"*Recenzoj* estas unu el la plej interesaj sekcioj de *E.I.*, ĉar el ĝi venas iom da lumo en la evoluado de nia lingvo. Oni ja devas batali por la unueco, por la pureco de la lingvo internacia, por ke ĝi ne fariĝu internacia jargono. Nia Lingva Komitato ŝajne jam delonge dormas. Kial do povus iu plendi kontraŭ *Recenzoj*?"

"Tamen nia samideano S. de Paauw en Nederlando deziras, ke ne estu recenzoj en Esperanto por ke tute libere ni antaŭen kuregu."

"Ĉu oni vere devas kuregi, aŭ eĉ kuri? Ĉu ne povos okazi, ke la dislokiganta aero forbloros la Esperanto-torĉon dum la kurado? Kaj ke ni eniros la infiniton kun nur mizere nigra karbaĵo en la mano?"

"Recenzu do, recenzu konstante. Bonvole zorgu ke almenaŭ en la oficiala organo de I.E.L. ne vagadu tiuj neologismoj."

M. Buchet (Francujo) skribas (ankaŭ pri la letero de S. de Paauw):

"Lingvo estas ne aparta, sed komuna proprajo de la uzantoj. Komuna profito ordonas ke oni ne staru nesenta antaŭ malklara aŭ erara esprimajo tial, ke la kutimigintaj eraroj povas naski daŭre malbonan uzadon. Tio jam estas ĝusta pri la naciaj lingvoj. Plej prave pri Esperanto."

"Nia internacio konsistas precipe el komencantoj. La kleruloj rajtas kaj devas korekti la pekojn kontraŭ la fundamenta spirito de la lingvo. La kleruloj devas eĉ sin reciproke korekti, sen ĉikana detalemo, sed ankaŭ sen malmodesta ofendsetemeco."

"Tia kunlaboro interesas ĉiujn Esperj antistojn kiuj amas sian lingvon ka volas konservi ĝin en ĝiaj pureco, klareco, precizeco kaj facila kompreniĝeco internacia."

STRANGA FENOMENO

Hieraŭ vespere mi vidis unu el la plej strangaj kaj interesaj fenomenoj de la naturo. La membroj de nia kurso estas tiom entuziasmaj, ke ili ofte kunvenas en privata hejmo inter la kutimaj ĉiusemajnaj kunsidoj por sin ekzerci en Esperanto kaj por restudi la lecionojn. Ni estis en la gastama hejmo de D-ro kaj S-ino W. D. Gilkey ĉe la marbordo kaj ni estis finintaj la legadon kaj amike interbabilis, kiam oni ekscite anoncis, ke la grunĵonoj (angle: *grunion*—malgranda fiŝo el la fam. salmo) estas sur la sablo.

Ĉiuj rapidis el la domo kaj komencis kolekti la fiŝojn, kiuj sin trovis pomile sur la sablaĵo kelke da metroj de la akvo. Tre verŝajne sur ĉiu kvadrata metro inter la plej altaj kaj plej malaltaj linioj de malseka sablaĵo sin trovis proksimume dek grunĵonoj.

La fiŝo havas la strangan kutimon demeti siajn ovojn en la sablaĵon. Nenie en la tuta mondo, krom ĉe la marbordo de la suda parto de la ŝtato California, Usono, kaj la norda parto de ŝtato Baja California Meksikio, estas troveblaj ĉi tiuj fiŝoj. La ino eliras el la akvo por demeti siajn ovojn kaj puŝas la suban duonon de la korpo en la sablaĵon. Tuj unu aŭ pluraj virfiŝoj aliras kaj duoncirkle ĉirkaŭas ŝin por surmeti la fiŝsemon. La ino ovmetas nur se unu aŭ pluraj virfiŝoj troviĝas ĉe ŝi. La virfiŝo estas longa proksimume 15 centimetrojn kaj la ino 16.6. Oni diras, ke ekzistas double tiom da virfiŝoj kiom da inoj.

La grunĵonoj venas nur en la monatoj Marto ĝis Aŭgusto kaj nur dum la dua, tria aŭ kvara nokto post la plenluno. En tiuj tempoj okazas la plej altaj tajdoj; tial la fiŝoj povas atingi la plej altan parton de la sablaĵo. La sursablirado daŭras unu horon kaj la meznombro de la belaj ruĝaj ovoj el ĉiu ino estas 2200. Ĉiu ovo havas diametron de unu milimetro. La ovoj subeniras sep ĝis dek unu centimetrojn kaj restas tie en la malseka sablo dum du semajnoj, ĝis la plej proksima alta tajdo de la malluma luno. Tiam la ovoj estas portataj en la oceanon kaj rapide fariĝas larvoj. Se la ovoj estas demetitaj tuj post malluma luno, ili restas unu monaton antaŭ ol forportiĝi.

Ni rapide havigis kelkcentojn da fiŝoj por ni kaj amikoj kaj trovis ilin bongustaj sed ostplenaj.

Chas. H. Briggs, San Pedro, Usono

LA SLOSILO DE LA FINA VENKO

En la marta numero de nia gazeto samideano Brendon Clark, Nov-Zelando, skribis pri niaj ambasadoroj, dirante ke ni devas konkeri la infanojn. La lernejo estas nia kampo. Pere de la infanoj ni sukcesos atentigi la gepatrojn kaj la eksteran publikon pri la utileco kaj graveco de Esperanto.

Mi kredas, ke li montris al ni la ŝlosilon, kiun ni devas uzi por malfermi la pordon al la fina venko.

La proverbo diras: Tio, kio estas frue semita, plej profunde radikiga.

Nun mi deziras doni raporteton pri miaj personaj spertoj.

Antaŭ kvar jaroj mi kolektis 16 knabojn en mia popololerna klaso. Ili havis intereson lerni lingvon, kiu ebligas al ili kontakti kun geknaboj eksterlande. Unu horon semajne ni studis Esperanton kaj mi uzis metodon, kiu instruis ilin kaj en la elementoj de la sveda gramatiko kaj en Esperanto. Mia celo estis montri al la lernejestro kaj aliaj instruistoj ke Esperanta instruado servas al la lernejo. Samtempe la lernantoj preskaŭ senpage akiros kapablon korespondi kun infanoj en aliaj landoj. Unu jaro pasis kaj mi estis kontenta rilate al la rezultatoj. La lernejestro kaj la gepatroj estis kontentaj. Ili laŭdis Esperanton.

Sekvis la dua jaro. La knaboj daŭrigis. Krome mi kolektis 16 novajn lernantojn sed nun knabinojn. Mi do instruis du grupojn. Kaj ankaŭ tiu jaro finiĝis. La ekzameno vekis grandan atenton. La gazetotj raportis favore. Oni laŭdis Esperanton.

Nun kelkaj el la knaboj forlasis la popollernejon por viziti mezlernejon. Ili estis ekzamenataj kaj montriĝis, ke inter 90 disĉiploj la Esperantostudentoj trege bone sukcesis. Ilija Esperantoscio helpis ilin. Mi notis tion kaj substrekis la valoron de Esperanto.

Nun la pionira grupo estis partigita. Por ne perdi ilin mi fondis Esperantogrupon *La Fajrero*. Tiu klubo kunvenis unu fojon ĉiusemajne.

La tria jaro venis. La knabina grupo daŭrigis la studadon. La knaboj de la klubo kunvenis. Mi denove kolektis 16 infanojn, nun 8 knabojn kaj 8 knabinojn. Kaj baldaŭ ankaŭ tiu grupo studis dum unu jaro.

Dum la studado mi verkis la lecionojn kaj sur la faritaj spertoj mi ekverkis lernolibron por lernejo. Danke al mona subteno de nun mortinta samideano—lia nomo estis Carl Winberg—la sveda Eldona Societo povis eldoni la lernolibron. Krome

tiu samideano donacis 10,000 svedajn kronojn, kies rentumo ĉiujare estos uzata por la bono de la Esperanta instruado en la popololerna de mia hejmurbo—Uddevalla.

Per tiuj ĉi informoj mi ne deziras produkti ian memlaŭdon. Mia intenco estas montri al io, kio ĉiulande povas esti imitata. La rezultato estas, ke ni en fruaj vivojaroj vekas la intereson de infanoj, kaj vi komprenas ke tiu intereso ne estas hazarda aŭ okaza, sed fundamenta.

Pli bone unu birdo sur la mano ol dek en la arbaro, diras sveda proverbo. Mi transformas ĝin kaj diras: Pli bone dek infanoj Esperantemaj en kurso ol tridek plenkreskuloj-komencantoj.

Nun la paco malfermas la limojn. La interkorespondado estas ebla. Miaj disĉiploj sendas siajn ilustritajn kartojn alilanden. Kun sopiro ili rigardas siajn leterkestojn, kaj kiam ili trovas tie karton aŭ leteron kun eksterlandaj poŝtmarkoj, iliaj vizaĝoj radias pro ĝojo. Ilia ĝojo estas sincera kaj kora. Iliaj gepatroj acetiĝis lernolibrojn. Parolante kun ili mi trovis, ke ankaŭ ili substrekis la valoron de Esperanto. Ili apartenas al la simpatiantoj, kiu en bezono apogos nin.

Antaŭ la milito ni havis tutmondan geinstruistan asocion, TAGE. Ni havis *Internacia Pedagogia Revuo*, IPR. Tiuj du faktoroj malaperis, kiam la kavaliroj de la pugno ekmarŝis tra Eŭropo. Sed nun ni denove havas pacon, kaj la internaciaj rilatoj estas renodataj. Estas absoluta devo starigi centran pedagogion, kiu internacie kunligas la lernejjajn kapablulojn kaj kreas kunlaboradon sur kampo, kiu vere estas unu el la plej gravaj de la Esperantista movado.

Se iu deziras doni al mi siajn vidpunktojn kaj havas intereson pri la restarigo de TAGE kaj IPR, bonvole skribu al mi.

*Instruisto Einar Dahl,
Box 900, Uddevalla, Svedujo*

SEPARO

Vi rec de mi forrapidas,
Denove ŝirregas separ'.
Vin for sen kompat' de mi gvidas
Kruela la fivagonar'.

Al vi potencarde min ligas
De l' am' la profunda sentar',
Dum griza krepusko paligas
La oron de via blondhar'.

Bild' via por mi ekheligas
Tra noktaj solec' kaj mallklar':
Plorante mi surgenuigas
Sur ŝtupoj de l' amoaltar'.

Lucien Lauvat, Francujo

LA FELICO

Ĉu vere estas, ke iuj homoj estas favorataj de la Sorto, bonŝanceluloj por kiuj la malbenajtoj de la vivo ĉiam glatiĝas? Oni sendube povas memori propran sperton pri tia ŝajno, sed la filozofio, la religio kaj la scienco, ĉiu de sia propra vidpunkto, neas la verecon de tio. Kaj ĉu estas kredeble, ke tia potenca trio eble eraras? Mi ne kuraĝas aserti tion. Tamen iuj faktoj, eĉ sur la kampo de la scienco mem, devas esti zorge kribritaj antaŭ ol oni povas starigi definitivan konkludon.

Ni konsideru la aferon, kiel ni propras persone spertis ĝin. La bonŝancelulon, kiun konstante favoras la Sorto, egale en grandaj kiel en malgrandaj aferoj, mi neniam renkontis. Li estas figuro plejparte naskita de la ĵaluzo kaj la ĉagreno. Ofte nur lia propra gajemeco ŝajnigas feliĉon, kaj per malmulta observado oni povas konstati, ke li ja spertas ĉagrenojn tiel same kiel ĉiu alia. Tamen, ne volante uzi la vorton "konstante", ĉu ni ne povas diri, ke ni ofte renkontis homojn intermite favoratajn de la Sorto—ĉu ni mem ne spertis feliĉajn tagojn? Certe ni ĉiuj spertis tion. Nu, ĉu tio estas ŝajnaĵo aŭ veraĵo?

Unue ni konsideru "malfeliĉajn tagojn". Mi bone memoras, ke kiam mi estis studento de scienco, se oni rompis aparaton en la kemia laborejo, oni kutime forlasis la eksperimentadon kaj sin turnis al analizado, kiun oni faris per malpli multekostaj provtuboj. Junece aroganta, mi nomis tion superstiĉo, kaj subtenis mian opinion en la praktiko—por mi iom multekosta afero. En tiu tempo mi ne konvinkiĝis—oni ja povas elfari klarigojn por ĉio—sed nun mi ne taksas ĝin superstiĉo. Ŝajnas, ke fuŝago, kiu sekvigas rompadon, nur montras ian fizikan staton, ĉu muskolan, ĉu nervan, kaŭze de kiu mankas al ni tiu intima rilato inter mano kaj okulo, neprè necesa por sukcesa scienca laboro. Kiam la studento parolas pri "malfeliĉa tago" li ĝis grado pravas, sed la malfeliĉo kuŝas ne en la tago, sed en li.

Sennombraj similaj okazaĵoj estas rimarkablaj sur la ludkampo. Ĉiu kiu ludis bilardon, sendube spertis tagojn, dum kiuj la pilkoj "ne volas ruliĝi", ankaŭ ĉe la golfudo, ktp. Mi kredas, ke la plimulto de homoj konsentas pri la supraj ekzemploj, ke malfeliĉo nur evidentiĝas ian fizikan aŭ nervan malbonstaton en la individuo; kaj egale pri la "feliĉaj" tagoj, ke la individuo ĝuas regadon super sia korpo, pli bonan ol kutime.

Sed kiel ĉio ĉi tio tuŝas aferojn eksterajn, kiuj ne estas la propraj agoj de la individuo?

Unu tagon oni sin turnas al amiko kaj trovas lin hejme; alian tagon li estas oririnta. Kaj notu bone, kiel ofte malbonŝancoj kunokazas! Laŭ la proverbo, *neniu pluvo sen pluvego*.

Mi serĉadas klarigon en la supre priskribita direkto, sed apenaŭ kuraĝas hipotezi korpostaton, kiu influas eksterajojn. Tamen dum pluraj jaroj, zorge kontrolitaj eksperimentoj en Usonaj kolegioj firme konstatis la faktoron ke la telepatio estas realaĵo. Sinjoro Dunne pretendas, ke ni ĉiuj posedas kapablon antaŭvidi okazaĵojn kaj li havas ne malmultajn disĉiplojn. Phoebe Payne, pere de sia sindetena kaj scienca priskribo, faras multon al forigo de blinda malakcepto kaj dogma neado antaŭ superfizikaj fenomenoj.

Estas eble, eĉ verŝajne, ke la evoluo nun progresadas laŭ tiu superfizika direkto kaj ke en la plimulto de homoj jam funkcias iuj nerekonitaj sentkapabloj. Ofte aŭdita frazo . . . *Venis al mi en la kapon la ideo, ke . . .* eble estas pli precize ĝusta ol oni intencis. Tamen de kie aŭ de kiu venis la ideo? . . .

Mi persone ankoraŭ ne konvinkiĝis, sed se en la raso nun evoluas—eĉ jam estas evoluantaj—iuj novaj sentkapabloj, ŝajnas al mi, ke tiel progresemaj kaj antaŭenrigardemaj homoj, kiel estas Esperantistoj, devas senti ian instigon antaŭ la penso, kaj pritrakti la aferon serioze.

T. K. Slade, Anglujo

La Recenzisto Respondas

En la aprila numero de *E.I.* aperis kritiko pri la kritikado. Mi esperas, ke la vidpunkto de la recenzisto iom valoras. Por respondi la punktojn menciitajn: en nacia lingvo oni ja kuraĝus kritiki la malfortajojn de verko. Oni tion faras kaj ni legas ilin ĉiutage. Cetere, mi opinias, ke se verkisto farus en sia lingvo la monstrajojn kaj erarojn, kiujn Esperantaj verkistoj faras, li kun malfacileco trovus eldoniston.

Ĉu ni restas ĉiam komencantoj infanaj? Ne. Tamen ĉiam estas inter ni komencantoj, kiuj kredeble bezonas gvidon pri sia legado, kaj bonvenigas helpon kaj konsilon en sia embaraso antaŭ fremdaj vortoj kaj esprimoj. Cetere, klara kaj simpla stilo, tuj komprenebla de ĉiuj, ne nepre devas esti "infane komencanta", ĉu?

Efektive Zamenhof estis prava pri la leĝo de la uzado, kaj se estas al mi donite iel influeti sur la uzadon per miaj kritikoj, mi klopodos, ke la uzado iru laŭ ĝusta kaj prudenta vojo de simpleco, klareco, neŭtraleco, kaj ne trafigu la lingvon en la haoson de dialektoj.

Mason Stuttard

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	19.00–19.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 25.34m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 16a de julio.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radiostacio, Moravska Ostrava.
Merkredo	01.10–01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la ĵaŭda programo por ekstereŭropaj landoj. Nur je la 17a de julio.
	16.00	Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	17.05	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	19.45–20.00	EAJ 14 (Hispanujo). Radio Castellón. 200m. Kurso de S-ro F. Rivelles.
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
Sabato	18.30-18.45(?)3	SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Brita somera tempo oni aldonu unu horon, kaj por Mez-Eŭropa somera tempo du horojn, sed notu ke pro la enkonduko aŭ ne-enkonduko de somera tempo en diversaj landoj ni ne povas esti certaj pri la ĝusteco de ĉi tiu rimarko. Ni urĝe petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevado.

Imitinda agado—S-ro J. Brownlee, Newcastle-on-Tyne, Anglujo, skribis ke li ofte aŭskultas la muzikajn programojn de Hilversum kaj Luxembourg, sed ne povas kompreni la nacilingvajn anoncojn de tiuj stacioj. Li, do, skribis al ambaŭ, petante anoncojn en du lingvoj—nacia kaj Esperanta. Jen imitinda laboro por ĉiu leganto. Ne limigu la skribadon al la du nomitaj stacioj, sed skribu al kiu ajn fremda stacio kiun vi de tempo al tempo aŭskultas. Oni povas tre taktoplene danki pro ĝuinda programo kaj samtempe aldoni sian peton.

ENIGMO-KONKURSO N-ro 6

Solvojn oni sendi al S-ro P. H. Mooy, 106, rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj el konkurso N-ro 4

N-ro 10—ansero, areno, astro, ateisto, atuto, aveno, aventuro, estro, etato, intesto, iriso, natrio, naturo, nervo, nesto, rento, retino, revuo, ruino, rusto, rutino, satiro, senato, serio, servuto, sireno, stano, stato, statuo, staturto, stearino, strato, strio, struto, sturno, sutano, teatro, teisto, tenio, teraso, tetano, tetro, tetrao, tiaro, tineo, tirano, titano, transito, trusto, truto, turisto, turto, universo, utero, vento, ventro, verso, versto, verto, vintro, virto, vistro, vitro.

N-ro 11—titoli—libera—rapide—decifri—frivola—lamentu—tulipo—podagro—groteska—karesi—siliko—kobalto—toleri—rimarki—kirasos—solena—naiva—valida—dativo—vokalo—lozango—ĝojigas—gastigi—giganta—tapiŝo—ŝoviĝi—ĝirafos—foliklo—klopodu—duone—neniam—amplekse—sekestri—triumfe—feliĉan—ĉantaĝis—ĝisvivi—vitrece—cekumo—molige—genia—amare—revuo—ofendi—diablo—blokado—dolaro—romano—novembro—brokanti.

Mi ricevis pli longajn ĉenojn, sed jam sufiĉas mi kredas.

N-ro 12—afabla, amara, agrabla, aparta, avara, banala, fatala, kapabla, sagaca, difini, distili, distingi, dividi, imiti, impliki, inciti, indigni, indiki, insidi, insisti, inspiri, instigi, intrigi, inviti, kritiki, likvidi, militi, pilgrimi, signifi, viziti, bombono, doktoro, fosforo, frontono, gondolo, hobojo, horloĝo, koboldo, kokono, kokoso, kolombo, kolono, koloro, koloso, komforto, komodo, kompleto, kompoto, kondoro, konkordo, kontoro, korolo, kotono, motoro, obolo, oktobro, ozono, pontono, popolo, prognozo, prologo, pronomo, rokoko, rotundo, skolopo, skrofolo, trombono.

Kelkaj solvantoj demandis al mi precize ekspliki, kion signifas "nederivita vorto." Laŭ mi alarm, inklina, odor estas radikoj ne

vortoj. La originalaj vortoj kiuj havas tiujn radikojn, estas alarmo, inklina kaj odori. Ili laŭ mi ne estas derivitaj, sed ĉiuj aliaj vortoj kun tiuj radikoj estas derivitaj, do alarma, inklina kaj odoro estas derivitaj de la originalaj vortoj alarmo, inklina kaj odori.

Enigmo N-ro 15—Ĉevalira enigmo.

Formu el la literoj de ĉi tiu figuro esprimon, kiu troviĝas en la proverbaro de D-ro Zamenhof. La substrekitaj literoj estas la konkliteroj.

Mi supozas, ke ĉiu scias la irmanieron de la ĉevalo en la ŝakludo.

```

.....
A  N  A  R  O  A  S
.....
L  E  P  L  O  B  R
.....
E  I  T  O  U  A  T
.....
S  A  O  S  U  D  A
.....
S  M  O  O  R  E  N
.....
B  S  I  A  I  T  O
.....
A  U  U  D  T  T  Ĉ
.....
    
```

5 poentoj.

Enigmo N-ro 16

Ĉu ekzistas en la mondo du arboj kun la sama nombro da folioj? Sola jes aŭ ne ne sufiĉas. Vi bonvolu rezone pravi vian respondon.

5 poentoj.

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

ALLAN KARDEC

Mondfama religia-filozofia verko pri Spiritismo.

El la franca originalo tradukis D-ro Porto Carreiro Neto, L.K.

531 paĝoj sur bonega papero.

Prezoj: bind. 12s. 9p., broŝ. 10s. 6p., afranko 9p.

Mendu ĉe I.E.L.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 183

OFICIALA INFORMILO

3an Junio, 1946

NOVAJ DELEGITOJ

Argentino

Rosario. VD : J. Cupé, S. Luis 1776.
Tel : 21596.
FD (Industrio kaj Komerco) : La VD.

Aŭstralio

Sydney (N.S.W.) FD (Kont-scienco) : F-ino
A. Shirvington, Box 25, Post Office,
Milson's Point.

Aŭstrujo

Steyr. D : H. Zeller, Schlüsselhofgasse 25.

Brazilo

Rio de Janeiro. FD (Libro-komerco) : I.
Gomes Braga, Rua Ramon Franco 63
(Urca). Tel : 26-3682.

Britujo

Largs (Skotlando). D : G. Stewart, 5
Lindsay Crescent, Largs, Ayrshire.
Mansfield (Notts.) D : Pastro K. Twinn,
38 King Edward Ave.
FD (Lingvoj ; Religio) : La D.

Bulgarujo

Assenovgrad. D : K. Georgiev, str. Bako
Dinĉjo 6. Tel : 89.
Burgas. D : N. Mihajlov, str. Car Simeon
72. Tel : 20-13.
Kavarna. D : Ivan K. Ivanov, Ul. I-N 12.
Pavlikeni. D : D-ro B. Nedkov.
Plovdiv. D : I. G. Savov, Volga 38.
Popov. D : Ilija Petrov, gimnazia instru-
isto. Tel : 62.

Ĉeĥoslovakujo

Cheb. D : Fr. Patera, trida Frant.
Kocourka 42. Tel : 624.
Doksy. D : V. Špur, Doksy ĉe lago de
Mácha, 453. Tel : 141.
Olomouc. D : A. Neuzil, Husitská 12,
Olomouc XI.
Suchdol n. Luz. D : K. Beran, Suchdol
nad Luz No. 341.
Tepeře. D : A. Novotny, Tepeře N-ro 61,
apud Zelezny Brod.
Ustí. D : J. Dušek, Jeseninova 243, Ustí
n/L-Strěkov II. Tel : 6151.

Danujo

Kolding. FD (Fervojoj) : N. K. Nielsen,
Aagade 15-II. Tel : 853.
FD (Filatelo ; Instruado) : C. P. Wolder,
Ndr. Ringvej 27 St.
FD (Ĝardenkulturo) : R. Knudsen,
Vifdam 14.
FD (Komerco) : H. Thomsen, Domhus-
parken 23. Tel : 2018.

FD (Sako) : E. Clausen, Ndr. Ringvej
27-I. Tel : 441.

Odense. FD (Masonado) : O. Andersen,
Østervaenget 1-I.

Støvring. D : F. Ulrich, Viborgvej 5,
Støvring St. Tel : 50.

FD (Ĝardenoj ; Amatorfotografado) :
La D.

Finnlando

Helsinki. FD (Filatelo) : A. Lundström,
Pengerkatu 21 A 8.

Kyyjärvi. D : Onni Virkkala.

Lappeenranta. FD (Laboristaj aferoj) :
V. A. Kallio, Valtakatu 37 C 25. Tel :
1171.

Porvoo. D : Arvi Korpi, Porvoo as.

Rekola. FD (Elektro-tekniko) : Timo U.
Kosti. Tel : Helsinki 031-845.

Franca Ekvatora Afriko

Brazzaville. FD (Meteorologio) : F. Knecht,
Station Météo.

Franco

Bordeaux. VD : R. Ferdinand, 20 Rue du
Béquet, Bègles (Gironde).

Don (Nord). D : Omer Lemichez, Chemin
de Halage. Tel : 8.

Drancy (Seine). FD (Sindikataj aferoj) :
L. Manuel, 69 Rue de la République.

Sisteron (B. Alpes). D : P. Bernard, 63
Rue Droite. Tel : 98.

Versailles. D : L. Chilard, 5 Avenue de
Saint-Cloud.

Hispanujo

Castellon de la Plana. FD (Sporto ;
Naturo) : J. B. Feliu Bover, San Vicente
20-I. Tel : 2298.

Hungarujo

Ĉefdelegito. P. Balkanyi, Budapeŝt 507,
Kreditbanko.

Békéscsaba. D : D-ro Imre Bazsó, O.T.I.

Budapeŝt. FD (Parlamento) : I. Csurgai,
parlamentara deputito, Vágóhid utca 33,
Budapeŝt IX. Tel : 182.260.

FD (Pedagogio) : A. Pechan, Herman-ut
18, Budapeŝt II.

FD (Polico) : D-ro V. Tóth, Jolsva u.4,
Budapeŝt III.

Debrecen. D : G. Berki, Királyi Tábla.

Kalocsa. D : F-ino I. Bodor, Csap utca 16.

Mátészalka. D : D-ro Jenő Fuchs.

Óbuda. D : Prof. R. Wagner, Majláth
u. 26, Budapeŝt III.

Pécs. D : D-ro I. Balla, Mátyás Florián-u.
51. Tel : 26-89.

Szeged. D : E. Farkas, Kecskeméti u. 12.

Jugoslavujo

Ljubljana. D : T. Logar, Sv. Petra Cesta 38. Tel: 44-80.
 VD : S-ino O. Aleš-Topolovec, Šibeniska 12.
 FD (Filatelo) : A. Sterlé, Marmontova ul. 17.
 FD (Komerco) : D. Mizerit, Baragova 9-I. Tel: 47-08, 25-67.
Šibenik. VD : R. Petković, Postolarska zadruga.

Varazdin. D : B. Vančik, Javno tuĝiostvo. Tel : 28.
 FD (Esp.-propagando) : La D.
 FD (Juro) : La D.
 FD (Instruado-virinfaka) : S-ino B. Vanek, Frankopanska 3.
 FD (Komerco) : J. Gjurass, Zagrebačka 45.
 FD (Teatro) : F. Majetić, Varodno kazalište.

Zagreb. FD (Kemio) : F-ino N. Gropuzzo, Harambašičeva 19-I.

Kenjo

Embu. D : J. Williamson, C.M.S., Kigari, Embu.

Nederlando

Dordrecht. D : A. De Visser, Oudehovenstraat 6. Tel: 5707.
Ede. D : F-ino T. Putto, Parkweg 31.

Polujo

Pruszcz. FD (Ŝako) : S. Czerniaków, Pruszcz Gdanski. Tel: 15.

Svedujo

Stockholm. FD (Korespondado) : F-ino M. Gustafson-Gallmer, John Ericsonsgatan 11. Tel: 514138.

Usono

Detroit (Mich.). FD (Judismo) : H. Mandel, 2301 W. Philadelphia. Tel: TY-7-4644.
 FD (Muziko) : S-ino M. Vicary, 2387 Woodstock Drive. Tel: TO-8-8009.

ŜANĜOJ

Brazilo

Rio de Janeiro. FD (Katolikaj kaj Skoltaj Aferoj) : vakas pro morto.

Britujo

Glasgow. FD (Fervojoj) : Vakass pro translokiĝo.

Knutsford. D kaj FD : Vakass pro translokiĝo.

London. FD (Komerco) : adreso : 50 Golden House, Gt. Pulteney St., W.1.

Yate. D : nova adreso : 33 Moorland Road.

Ĉeĥoslovakujo

Lovosice. D : vakass pro translokiĝo.

Danujo

Fredericia. FD (Navigacio) : nova adreso : Egumvej 18.

Irlando

Belfast. FD (Historio) : nova adreso : Kilgreel, Templepatrick, Co. Antrim.

Italujo

Firenze. VD : vakass pro morto.

Kenjo

Kaloleni. D : vakass pro translokiĝo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro H. Nilsson, Malmö, Svedujo.
 S-ro A. Weide, Ringkøbing, Danujo.

PATRONOJ

24. S-ro J. Dusausoy, Paris, Francujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ

230. S-ro L. Bastien, Paris, Francujo.
 231. F-ino S. Linnander, Stockholm, Svedujo.
 232. D-ro G. T. Knol, Coevorden, Nederlando.
 233. S-ro P. van Delden Szn, Deventer, Nederlando.
 234. S-ro H. Boffejon, Antwerpen, Belgujo.
 235. S-ro J. Thorsteinsson, Siglufjörður, Islando.
 236. S-ino G. T. Knol-Derksen, Deventer, Nederlando.
 237. S-ro R. W. Rayner, Nairobi, Kenjo.
 238. S-ro H. Nonin, Chatillon-sous-Bagneux, Francujo.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Majo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Majo 1945 :

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	2974	4798
Individuaj Membroj :		
MJ	643	838
MA	1370	3519
MS	104	236
Patronoj	21	23
DM	73	95
HM	9	20
	2220	4731
	5194	9529

Korespondajoj en Majo 1946 :

Ricevitaj 829
 Senditaj 1387

Sumo (sen la gazeto) .. 2216

DONACOJ por helpi al la forigo de la Deficito : T. J. Gueritte 40\$, E. J. Williams 5\$, J. Dusausoy 18\$.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo: H. W. Allen-Smith £5, W. H. Hirst 30s., T. J. Gueritte £2, J. Course (Royston) £5, C. A. Baker £1, W. Chitty £2, D-rino E. Evans 5s., J. M. Baxter 10s., F-ino L. M. Deane £1, H. Jordon 21s., D-ro W. A. Gibson £5, F-ino N. Ford £1, J. P. MacLean 42s., J. R. Miller 5s. 6p., G. W. Roome 10s., M. Pearson 32s. 6p., J. T. Haxton £1, J. D. O'Dell 10s., R. R. Tredgold £5.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Jarlibro—La jarlibro eliris en la fino de Majo kaj komenco de Junio. Se iu paginto ne ricevis ĝin, li bonvolu informi la Centran Oficejon.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

LINGVO-ESPLOROJ EN SOVET-UNIO

Malnova polemiko reokazas pri tio, ĉu la uzado de la ilaro aŭ de la lingvo estas la diferenciga distingo inter la homoj kaj la ceteraj bestoj; ĉu la ago aŭ la vorto estis la unua. Oni demandas al si, ĉu ĉe tio temas pri efektiva alternativo, ĉar povus ŝajni al ni, ke la kolektiva uzado de la ilaro devis iri manon en mano kun la ekinterkomprenigado de la gentanoj, ke kaj la ilara kaj la lingva uzado evoluis samtempe. Ĉiuokaze la homa lingvo estas per si rimarkinda studobjekto.

La aspektoj de ĉi tiu studo estas tre multnombraj. Por nomi nur kelkajn: la logikan aspekton; la logikan gramatikon de la lingvo; kiel estas utiligataj la frazoj de la lingvo en la ĉiutaga kaj scienca uzadoj por priskribo de la mondo; kian rolon ludas la frazoj en la matematiko kaj la logiko.

La lingvo-psikologoj sin okupas pri la psikologia transiro ĉe la parolo kaj kompreno. La filologo studas la lingvo-materialon kaj ĝian transformiĝon, la gramatikon en vasta senco de la vorto, kaj ĝiajn ŝanĝojn. Ke la parolo estas socia fenomeno kaj la lingvo *historia* formajo, oni ĝenerale rekoras; sed oni komprenas, ke la klarigo de la lingvo-evoluo postulas sciencan histori-koncepton, kaj devas fiaski sen ĝi.

Sekve de la prelego de akademiano T. J. Meschtschaninow dum la 220-a datreveno de la fondo de la Rusa Akademio de Sciencoj, pretendis la antaŭ II jaroj mortinta Nikolao Marr kaj lia skolo, la evoluon de tia historia lingvo-teorio.

Ili klarigis, ke la lingvo-scienca devas uzi la metodon de la historia materialismo por kompreni la socian funkcion kaj la proprecojn de la lingvo. Marr kombinis la studon de la lingvo de unu homgrupo kun la studo de ilia historio, iliaj moroj kaj kutimoj; li konkludis el tio, ke la lingvo

estis kreita de homoj, kiuj estis kunligitaj per ilia laboro kaj devis interkompreniĝi. Grupetoj evoluigis siajn specialajn kaj proprecajn lingvojn. La rilatoj de diversaj grupoj kaj la reciproka lingvo-influo estis bagatelaj. Similecoj inter iliaj lingvoj estas klarigitaj ne sekve de la komunaj lingvo-radikoj, sed sekve de la homogenaj origin-kondiĉoj. Naciaj lingvoj ekestis nur tiam, kiam la grupoj kunligiĝis je popoloj kaj nacioj. Kunfandiĝo de gentlingvoj—ne displitiĝo de *pralingvo* de neekzistanta prapopolo, ekzemple de la *Hindo-Eŭropanoj*—karakterizas la lingvo-evolucion.

La observataj lingvo-forŝoj estas klarigeblaj ne kiel sekvoj de la interna procedo de lingvo-evoluo, sed kiel sekvoj de certaj historiaj ŝanĝoj de la socia medio.

La rusaj esploristoj ekzamenis siajn teoriojn sur la bazo de la lingvo-historio de sia multlingva lando. Ili faris provojn ekzemple ĉe la popoloj, al kiuj ili donis skriblingvojn kaj kies lingvoreagojn ili studis en la rapide ŝanĝiganta socia medio. En iliaj manoj la lingvo-esplorado fariĝis eksperimenta scienca teorio kaj la scienca teorio fariĝis direktivo de agado kaj kultura kontribuo, kiun la progresemaj sovetoj disponigas al siaj primitivaj fratpopoloj.

D-ro A. Mildworf, Aŭstrujo

ITALUJO

Multaj samideanoj skribis al E.N.I.T. (Ente Nazionale Industrie Turistiche, Via Merghera 2, Roma) instigante la estraron denove eldoni gvidilojn kaj ree disradiigi la ŝatatajn *Italaj Turismaj Kronikojn*. Oni ankoraŭ memoras pri la ĉiusemajnaj radio-dissendoj, pri la radio-konkursoj, pri la vere artaj eldonadoj kaj pri la verda broŝuro enhavanta la monatan programon de la Roma elsendejo radiofonia. La milito neniigis niajn oficejojn, sed nun ni komencas labori kaj Esperanto-Fako tuj reprenis sian postenon por plenumi kun vigla entuziasmo sian utilan laboron favore al itala turismo per nia internacia helplingvo.

Kiel eble plej baldaŭ ni intencas:

- (1) eldoni unuopajn gvidilojn,
- (2) ebligi turisopajn aŭ grupajn vojaĝojn tra Italujo,
- (3) disradiadi denove la famajn *Italaj Turismaj Kronikojn*.

Intertempe bonvolu interrilati kun Esperanto-Fako de E.N.I.T. prezentante proponojn, sugestojn, konsilojn; petu broŝurojn, gvidilojn, informojn pri rilata aferoj; petu tujan eldonadon de presajoj en Esperanto. Ni nepre respondos.

La Esperanta Voĉo

E.N.I.T., Radio Turismo-Roma, Italujo.

Vol. VII de la "Epoko" serio de
libroj estas

SEP VANGOFRAPOJ

de K. ASZLÁNYI

Tradukita el la hungara lingvo de
L. SPIERER

Kiu donis la vangofrapojn? Al kiu?
Kaj pro kio? Kiu deziras respondon
al tiuj demandoj, nepre legu la verkon;
li certe neniel bedaŭros la legadon.

Prezo: 3 ŝilingoj, afranko 3p.

Eldonita de
ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

La nova gazeto
por ĉiu!
- interesa
- 12 paĝa
- ilustrita



La abonkotizo por tiu sen-
dependa monata gazeto estas
por la jaro 1946 19 int. resp.
kuponoj aŭ egalvaloro al landa
peranto. (En angla mono
7 ŝil. 6 p. pagota al I.E.L.)
Provnumero kontraŭ unu int.
resp. kupono.

MONDA REVUO ilustrita,
Poŝtkesto 30,
Randers, Danujo.

LA INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ

FILATELO PER ESPERANTO

Ĉu vi pripensis la grandegan propagand-valoron de faka revuo
kun **Esperanto-tekstoj**, en kiu reklamas gravaj entreprenoj?

Tian propagandon faras la organo de I.A.P.K., kiu parbas por
Esperanto inter Filatelitoj, al kiuj ĝi samtempe liveras la plej
bonajn servojn pri poŝtmark-kolektado.

Nia Revuo nun aperas dulingve—angle kaj Esperante. Baldaŭ
ni eldonos Internacian Fakrevuon **ekskluzive en Esperanto**.
Subtenu do nian laboron.

ESPERANTO PER FILATELO

Petu informon de la Organiza Sekretario:

P. H. LEWIS, XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo

Muusses Esperanto-Biblioteko

DENOVE HAVEBLA

1. **La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo.** Julius Glück.
2. **Rusaj noveloj.** M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak. Tradukis A. Filatov.
3. **De Muheddin ĝis Mundilatin.** Verkis Teo Jung. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
4. **Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.** Joseph R. Scherer.
5. **El la klasika periodo de Esperanto.** Julius Glück.
6. **La Kongresaj Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof.** Unua parto.
7. **La Kongresaj Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof.** Dua parto.
8. **La Avo.** Aleksandro Petöfi. El la hungara originalo tradukis L. Spierer.
9. **La Ĵusnaskito.** Ricardo Becerro de Bengoa. El la hispana originalo tradukis J. F. Berenguer.
10. **La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912 (Krakovo).** Aranĝis kaj kompilis J. Glück.
11. **La Ora Jubilea Kongreso de Esperanto 1937 (Varsovio).** Aranĝis kaj kompilis J. Glück.
12. **Nordnordaj Fabeloj.** J. Thézard. Ilustritaj per kvin desegnoj de la aŭtoro.
13. **En la vagono** kaj aliaj rakontoj. Ivan Ŝirjaev.
- 14-15. **La problemo de Lingvo Internacia.** D-ro Björn Collinder.
(Notu : duobla numero kaj duobla prezo).
16. **Rozinjo.** Gyula Török. El la hungara originalo tradukis K. Kalocsay.
17. **El la Londona Skizlibro.** Charles Dickens. El la angla originalo tradukis Fred Wadham.
18. **Flugado Alimonden.** Ernest Dodge.
19. **Patro kaj Filo** kaj aliaj rakontoj. Jordan Jovkov. El la bulgara originalo tradukis Ĥristo Iskrov.

Prezo de ĉiu numero 10 pencoj aŭ 3 respondkuponoj, afrankite.
La tuta kolekto samtempe mendita 12ŝ. 6p., afrankite.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

